starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1972 3-4

# KONSCIENCO DE NIA EPOKO



Josef P e c a : el la ciklo LA VIRINOJ DE LIDICE

La 10-an de junio 1942 - do antaŭ 30 jaroj - la nazioj murdis 163 virojn el Lidice. El la brakoj de patrinoj ili fortrenis 105 infanojn en faŝistajn koncentrejojn kaj la tutan lokon per fajrego ekstermis, postlasinte eĉ ne unu ŝtonon tie, kie iam troviĝis la ĉeĥa minista vilaĝo. El 105 infanoj restis sole 17 ; la ceteraj malaperis en la faŝistaj gasmurdejoj. La restintaj estis destinitaj por germanaj seninfanaj familioj kun unusola celo : la infanojn germanigi !

La ruinigo de Lidice vekis indignon en la tuta mondo. La anglaj ministoj tiam iniciatis tutmondan kampanjon "Lidice vivos" kun la celo kolekti materiajn rimedojn por rekonstrui la detruitan vilaĝon. Al multaj homoj la sorto de Lidice malfermis la okulojn kaj ili komencis kompreni, ke la naziismo estas degeneraĵo de la homaro. La esprimoj de solidareco kun Lidice fariĝis belaj ekzemploj de internacia kontraŭfaŝista batalo.

Lidice denove vivas kaj estas simbolo de amikeco kaj paco inter la popoloj, simbolo de vivo kontraŭ morto.

LA IIa KONGRESO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO PROKRASTITA ĜIS 1973

# KUN KLARA PERSPEKTIVO

Nia Esperanto-asocio, kiu konstituiĝis en la kriza periodo de nia lando, eklaboris laŭ siaj eblecoj kaj en la lasta tempo faris ĉion necesan por garantii pluan sukcesan disvolvon de la enlanda movado akorde kun la politiko de KPĈ kaj la direktivoj de ties XIV-a kongreso.

Tamen simptomoj de la kriza periodo ankoraŭ ne malaperis en la ĉeĥa movado. Kvankam la plejparto de la asocianoj akceptis la agadprogramon de ĈEA, estas esperantistoj, kiuj daŭrigas praktiki ian "kaŝludon" bojkotante, ĉu el la pozicio de la membroj ĉu el tiu de izoluloj, la principojn, sur kiuj sole povas hodiaŭ ekzisti kaj funkcii en ĈSSR la movado de la internacia lingvo. Unu el la rezultoj de tia ĉi sinteno flanke de la rondetanoj kaj funkciuloj estas fakto, ke nuntempe oni povas kalkuli nurajn 32 lokajn grupojn de ĈEA kaj apenaŭ 2000 pagantajn membrojn, dume la iama ĈSEK grupigis preskaŭ kvar mil esperantistojn.

Tiaj cirkonstancoj bedaŭrinde ne permesis al la gvidorganoj de ĈEA prepari taŭgajn kondiĉojn kaj ellabori dokumentojn por vere efika rezultigo de la anoncita IIa kongreso. Sekve la plenkunsido de CK ĈEA la 22an de aprilo 1972 d e c i d i s p r i l a p r o k r a s t o d e l a k o n g r e s o e n O s t r a v a ĝ i s l a v e n o n t a j a r o.

Denove montriĝas, ke de la esperantistaro mem dependas, kiom sukcesa estos ilia agado por la internacia lingvo. Ĉu oni povas esti kontentaj pri la laboro jam farita ? Ĉu ekzemple nia aktivado celas prosperon de la tuta socio ? Ĉu ĝi ne estas ofte formala, se ne sektema, kaj entute ĉu ĝi respondas la postulojn de la hodiaŭa epoko ?

La kongreso, kies preparo tiurilate konsistigos la esencan parton de nia porvenonta aktiveco, devus respondi ĉiujn ĉi demandojn. Ĝi devus esti klara manifestiĝo de nia unueco koncerne la ĉefajn problemojn menciitajn.

Oni ofte demandas, kial la Esperanto - movado en la aliaj socialismaj landoj ĝuas tiom altan prestiĝon, estas subtenata de la ŝtataj organoj kaj sukcese penetras en la publikan vivon. Efektive, la demando estas tute prava, sed ni mem devas serĉi ankaŭ la respondon.

Dum la lastaj jardekoj la homa penso, la scienco kaj tekniko faris konsiderindan paŝon... Tamen la adeptoj de la internacia lingvo, batalantaj por la unika ideo de la internacia amikeco, ĉiam pli kaj pli aktuala, ankoraŭ ne malofte aplikas metodojn ne adekvatajn al la epoko de la scienca revolucio. El anakronismaj vidpunktoj de la "pionira" periodo de Esperanto ili respondas demandojn de la progresinta 20a jarcento. Kaj ne unufoje, kun diletantismo de la etiket-kolektantoj, ili kuraĝas solvadi la seriozajn kaj komplikajn taskojn, kiujn amasigas ĉiutage la problemo de la internacia lingvo.

La laboro de pluraj Esperanto-grupoj en ĈSR pruvas, ke ili klare konceptis tiun ĉi problemaron kaj persistas en ties konkretigo. Ili servu kiel ekzemplo por la ceteraj.

Konsciaj pri nia r e a l a situacio ni komune kaj kun klara perspektivo klopodu krei pli solidan bazon por la Esperanto-movado en nia lando. La preparata asocia kongreso en 1973 estu nia unua decida paŝo !

/red/

# ,SET' DUDEKJARA

Unu tutan generacion de esperantistoj jam edukis Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Znojmo, aŭ pli koncize SET Lančov, kiel oni kutimas delonge nomi tiun ĉi plej gravan lernejan aranĝon por esperantistoj en ČSSR. En la dudekjara enlanda tradicio de SET ĝi konsistigas la esencan parton, kvankam ĝian originon metis antaŭ 20 jaroj la organizantoj de la 1-a SET en Žimrovice (Silezio) J.Kuzník,J.Solnický kaj V.Novobilskýkun aliaj

Fruktodona estas la sulko, kiun elfosis en Lančov la mastro tendara, Pavel S i t t a u e r kun aro da siaj fervoraj samcelanoj. Pli ol kvarmila vico da getendaranoj hodiaŭ defilas antaŭ lia spirita rigardo - sur la loko, kie oni okazigas "vicigojn" kaj komunan kantadon. (Kiom da sinofero ĉiujara, ĉiusemajna kostis kaj kostas tiu ĉi entreprenaĵo! )

Ankaŭ dekoj da eksterlandaj gastoj vastigis dum tiu ĉi tempo la famon pri n i a j SET-oj, tiel ke ili fariĝis kvazaŭ nia komuna teritorio, terpeco, al kiu ni ŝate revenados.

Dum longaj jaroj SET kompleze servis al ni, nun ĝi bezonas nian prizorgon por povi digne bonvenigi la vizitontojn. Volontuloj daŭre mankas ĉe konstru-laboroj kaj riparoj en tiu ĉi hejmo esperantista. Jen, estas ilia vico !

Multaj el ni "trasentis" sian esperantistecon instruante kaj lernante en la rondo tendarana ; kunside ĉe la tendara fajro aŭ embuske dum la nokta "gardado". Multegan ĝuon kaŝas tiuj momentoj por ni, sed ankaŭ la novan, belan revon por la venontaj generacioj. O.Kníchal



LA NUNJARA SET EN LANČOV estos en du etapoj (la 16a - 29a de julio kaj la 30-a de julio - 12a de aŭgusto). En la dua kurso estas ankoraŭ kelkaj lokoj liberaj, sed la tempo urĝas ! Se vi volas travivi neforgeseblan libertempon kaj samtempe lerni kaj praktiki la Internacian Lingvon, ne hezitu kaj sendu vian aliĝilon al Esperanta Rondeto en Třebíč, Kulturní dům Bedřicha Václavka.

# Slovakaj esperantistoj kongresis

Dum la tri lastaj aprilaj tagoj kunvenis en Tatranská Lomnica /sub Alta Tatra-montaro/ la 4a Kongreso de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko /AESSR/.

Kiel oficiala reprezentanto de ĈEA salutis la kongreson Drah. Kočvara, kiu samtempe klarigis la motivojn, kiuj prokrastigis la ĉeĥan kongreson en Ostrava. Entute kunvenis en Tatranská Lomnica 170 esperantistoj, inter ili la gastoj el GDR, Hungario kaj Pollando.

En la kadro de la kongreso kunsidis kelkaj fakaj sekcioj / pedagogia, junulara, sanitara kaj vegetarana/. La delegitoj el Košice akcentis la bezonon fondi sekcion de MEM. Tiuokaze ili devontiĝis gajni dek abonantojn de la gazeto PACO.

Kiel prezidanto de CK AESSR estis reelektita Pavel R o s a.

La plej grandan sukceson rikoltis projekciado de la kvina leciono de la televida kurso, kiu estas elsendota jam aŭtune. Reprezentanto de la Slovaka televido alparolis la spektantojn en Esperanto. Oni anoncis ankaŭ, ke la radio en Bratislava baldaŭ enprogramigos Esperanto-kurson por progresintoj.

En la kultura parto de la programo prezentis sin la jam konata E-kvarteto el Trenčín. Pri la rondvojaĝo de la košice-aj pupteatristoj en Danlando rakontis inĝ. Zvara.

La venontan kvinan kongreson oni proponis okazigi en Martin.

/laŭ raporto de D.Kočvara -knl-/

## NI KREU ORGANIZON KUN ALTAJ PRETENDOJ - LA ORGANIZO KREOS NIN !

Nia anaro /t.e.de Ped.sekcio de ĈEA/ plejparte konscias tiun ĉi fundamentan fakton. Obeante al la Statuto ni klopodas koncentrigi niajn fortojn por progresigi la lingvoscion de niaj membroj kaj plikvalitigi la Esperanto-instruadon kaj ĝian disvastigon en la pedagogiaj rondoj.

La unua el 13 taskoj de nia laborplano parolas pri la varbado de novaj anoj. Mi estas konvinkita, ke ni ne estas informitaj eĉ pri tiuj, kiuj grave kontribuas al la celoj de nia Sekcio. Ili eble preferas labori ermit-maniere,ili eble ne kuraĝas, eble kulpas ni ĉar ni ne sufiĉe klare etendis nian manon al ili.

Kaj nun la tasko n-ro 1 por niaj konsciaj laborantoj : En kiuj regionoj sin anoncos "libervolaj batalantoj kaj varbantoj"por funkcii kiel perantoj inter la sekretariejo kaj nia anaro ? Ankaŭ la lamanta percirkulera kontakto kun la sekcianoj dependas de pluaj sinoferemaj multobligantoj. Interesa estus enketo, kiom da libera tempo vi oferas por via sekcio aŭ por la Asocio. Ni ĉiuj estas libervoluloj kaj ne ĉiu el ni kapablas plenumi ĉian laboron.

K.Kraft

## Konferenco en Berlino

"La geesperantistoj organizitaj en la Germana Kulturligo ĉiam klopodas plialtigi la kultupolitikan efikon de sia laboro kaj varbi novajn amikojn al sia interesa kaj bela agado", proklamas la rezolucio de la E-konferenco okazinta en Berlino inter la 26.5 kaj 29.5.1972.Pri la aktualaj problemoj de la esperantistaro en GDR parolis la prezidanto de Centra Laborrondo Rudi Graetz. La ĉeftemo de la diskutado,kiu sekvis, estis la socialisma internaciismo.

Enkadre de la konferenco okazis la 29an de majo kunsido de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj (Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio) pri iliaj taskoj en MEM, kunordigo de lingvistikaj esploroj k. a. Por ĈSSR partoprenis ark.J.Drlík.

# Rondeta vivo

B R N O - La 28.3.okazis Printempa Koncerto,kies programestro kaj pianakompananto estis prof. V.Scheiber kaj artistoj H.Halířová-Supová, R.Chudoba kaj L. Schnürmacher. Partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj. Enkadre de la koncerto estis rememorita la 380-a datreveno de la naskiĝtago de J.A.Komenio.

La programo preparita kaj prezentita de s-ano profesoro Scheiber kun la famaj gekantistoj viciĝis al la jam multegaj same neforgeseblaj solenaj art-vesperoj. La koncerto estis anoncita en la urba disaŭdigo treege konvene, prizorgis s-ro Z. Hršel. Por aŭtuno estas preparata granda estrado.

El la programeroj de EK menciinda estas memorigo de Zd.Hršel : "Kaj tamen vivas Lidice".

H R A D E C  K R Á L O V É - Por la 28-a de marto kunvokis la loka klubo sian jaran kunsidon ; en ĝi partoprenis la plimulto de la membroj. Edife efikis la diskurso de la agema prezidantino Zd.Matyková, kiu konstante fruktodone kunlaboras kun la varsovia radiostacio.Oni atente akceptis ankaŭ la elokventan jarraporton de la sekretario Mir. Hromas.

Sekvis vigla diskutado, el kiu precipe la gejunularo rikoltis utilajn konsilojn. Entuziasman aprobon akiris la propono de la prezidantino, ke oni intertraktu pri ĝemeliĝo kun samideana grupo el iu pola urbo. Plue oni dediĉis intereson al la nemalriĉa biblioteko kaj al la problemo kiel ebligi ties uzadon al pli vasta publiko.

La ĝisnunan estraron oni unuanime reelektis por la plua jaro.

M. Lukáš

K Y J O V - La nova koresponda adreso de EK estas : Esperanto Klubo, poŝtkesto 45, Kyjov, distr. Hodonín. (Prez. Ant. Jandík, sekr. Vl.Hasala).

L I B E R E C - Antaŭnelonge la membroj de EK ricevis en siajn manojn la unuan numeron de belaspekta neregula cirkulero. Ĝi estas p r e s i t a (!) kaj eldonita komune por EK Jablonec kaj Liberec. Ĝia nomo estas LIBERECANO kaj ĝia redaktoro estas Ladislav Špína.

M Ě L N Í K - En sia monata informilo EK en Jungmannovy sady sciigas pri sia porsomera aktiveco - ekskurso al Moravio (17.-18.6) kun mallonga vizito al S E T Lančov. La ĉijarajn kursojn partoprenos tie 22 membrojn de la klubo. Preparata estas semajna ekskurso al Pollando (30.6 - 6.7.1972).

Eksterordinare ĝojiga estas la novaĵo ke el cent rondetanoj ĉiuj estas membroj de ĈEA. La 100a ano aliĝis en tiuj ĉi tagoj.

O L O M O U C - Ĝenerala kunveno de EK okazis 21.3. 72. Kiel prezidanto reelektiĝis d-ro Mohapl, vicprezidantoj estas s-roj Pospíšil kaj Římský, sekretario s-ro Blažek, kasistino s-ino Čepová.

Sukcesplena estis prelego kun lumbildoj pri Vjetnamio. Oni sendis salutleteron al la ambasado de VDR. En la agado de EK grava estas ankaŭ kunlaboro kun Distrikta Packonsilantaro en Olomouc.

EK invitas la amantojn de rozoj al la ekspoziciejo "Flora", kiu disvastiĝos je nova areo "Rosarium". La 26-an de aŭg. oni festos la 40-an datrevenon de la ekplanto de ESPERANTO-ARBO "Liriodendron tulipifera" kaj de la nomigo de STRATO DE D-RO ZAMENHOF.

La klubejo en Olomouc havas novan bele aranĝitan montrofenestron sur la placo Náměstí míru n-ro 11, kontraŭ la urbodomo.

O S T R A V A (VŽKG) - La jarkunveno de la klubo (22.3.) elektis la novan komitaton, en kiun eniris : D.Kočvara (prezidanto), J.Hanzelka, vicprezidanto, M.Sova , sekretario. Inter la aliaj funkciuloj estas L.Juřicová, K.Fremlová,K.Vala, M.Němec, ing. J.Fux, G.Hečko,d-ro B. Novotný kaj J.Václavík.

La membrokotizojn de ĈEA jam pagis por tiu ĉi jaro pli ol sesdek membroj.

P R A H A - La unuan de majo oni bonvenigis en la praga EK per prezentado de am-versoj el la poemaro "Kontralto" de M. Boulton fare de la junulara gvidantino Olga Šádková.

Salutojn kaj bondezirojn okaze de la unuamaja festo sendis al ĉiuj anoj de la klubo N.Andrianova, prezidantino de Ukraina Esperanto-Komisiono.

Š U M P E R K - La 2an de majo 21 novaj esperantistoj finis la bazan kurson. El ili 18 sukcese trapasis la ekzamenojn, plejparte eminente.

Z N O J M O – ER ĉe la agrikultura mezlernejo okazigis kurson por 14 komencantoj. Ili jam ĉiuj korespondas kun gestudentoj el la tuta mondo. Libertempe oni vizitos Hungarion.

## Samideana kroniko

Post suferiga malsano forpasis la 25an de majo en la aĝo de 69 jaroj s-ro Jaroslav B á r o c h el Praha. Inter 1934–1941 li funkciis kiel sekretario de EA ĈSR. Honoron al lia memoro !

La 1-an de majo atingis sian 65an vivjubileon Adolf B a r t o š í k, vicprezidanto de Esperantista Klubo en Praha, konata inter la esperantistaro pro siaj desegnaĵoj kaj grafikaĵoj en diversaj E-gazetoj.

Per sia elstara filatela kolekto "El la historio de la internacia lingvo Esperanto" li gajnis en tutmonda ekspozicio kaj en ekspozicioj naciaj du orumitajn kaj sep arĝentajn medalojn.

En Olomouc festis sian 70-an naskiĝtagon longjara kasistino de la esperantista klubo Gusta Č e p o v á.

La 10-an de julio festos sian 50 - an naskiĝtagon PhDr. Jaromír J e r m á ř, CSc, estrarano de CK ĈEA, la iama prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj redaktanto de Informoj de ĈSEK.

La 25-an de aprilo kvindekjariĝis RNDr Josef K a v k a CSc, laboranto en la Esp. geologia sfero ; aŭtoro de GEOLOGIO INTERNACIA kaj de la Esp. nomenklaturo en la POŜATLASO DE LA MONDO EN ESPERANTO. Al d-ro Kavka estis komisiita en aprilo la funkcio de ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) pro kiu ni sincere gratulas !

Geedziĝis en Mělník la 20an de majo ĉj. Blanka Ž í t k o v á kaj Pavel H r b e k. Sincerajn gratulojn !

---

AL EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ ofertas loĝigon ev. ankaŭ manĝadon Josefina Marešová, Jaroměř IV/139, Na záchraně, okr. Náchod, ČSR. La loko estas unika por diversaj ekskursoj, situante proksime de la famekonataj historiaj kaj naturaj vidindaĵoj nordbohemiaj.

### MEMORE AL RUDOLF B U R D A (1902 - 1972)

La 9an de aprilo estus ĝisvivinta sian 70-an jaron Rudolf B u r d a, unu el la plej meritplenaj esperantistoj ĉeĥoslovakaj. Esperantisto ekde 1921 li fondis en Plzeň la filion de SAT - societon de la germanaj esperantistoj "Liberiga Stelo". Dum la milito li suferis kelkajn jarojn en la nazia koncentrejo. Post la likvido de EAĈSR en 1952 li komencis eldonadi la gazeton "La Pacdefendanto".

La precipa merito apartenas al R. Burda kiel iniciatinto kaj kunfondinto de Mondpaca Esperantista Movado en 1953, kies prezidanto kaj redaktoro de la ĉs. eldono de PACO li estis.

Kune kun la progresemaj esperantistoj en la tuta mondo ni rememoru tiun ĉi elstaran batalanton por la ideo de socialismo kaj internacia lingvo. (k)

## Politeknika vortaro preparata

La 24-an de aprilo 1972 okazis en Havlíčkův Brod laborkunveno de la reprezentantoj de la Fervojista Sekcio (inĝ. J. Řebíček) kaj Teknikista Sekcio (inĝ. A. Bednařík) por kunordigi la laborojn super la fervoja terminaro ĉeĥa-Esperanta-ĉeĥa, farata de Terminologia komisiono de FS unuflanke kaj de TS (politeknika vortaro ĉeĥa-Esperanta) aliflanke.

Oni informiĝis pri la stato kaj la teknika flanko de la laboroj kaj diskutis pri la manieroj de kunlaboro. Konklude oni konstatis, ke la laboro estas en progresinta stato, oni konjektas eldon-preparitecon post du, tri jaroj kaj havas akordan opinion, ke estu eldonita unu komuna vortaro politeknika. Estis interkonsentita ankaŭ la maniero de akordigo de terminoj per interŝanĝo de manuskript-malnetoj.

La Teknikista Sekcio prikonsideros personaran eblecon de samtempa disvolvo de la laboroj super la Esperanta-ĉeĥa slipgivaro. A.B.

KONKURSO DAŬRIGOTA ! Por ĉiuj interesatoj restas ankoraŭ ebleco partopreni en la literatura konkurso proklamita de STARTO (n-ro 1/72, pĝ.6) kaj sendi la konkursaĵojn al ĈEA ĝis tiu ĉi jarfino !

PREPARANTE LA ESPERANTAN VORTARON EN MOST

# Povas helpi pozitiva kritiko de ĉiuj

Pri la ĉeĥa-Esperanta vortaro preparata en Most estiĝis diversaj opinioj kaj eĉ malveraj informoj. Ĉefaj riproĉoj tuŝas precipe la ekonomian flankon /1/, ties amplekson /2/ kaj garantion /3/, ĉu la verko povos esti kompletigita. Je la unuopaj punktoj respondas nun d-ro Josef Č e r n ý :

(1) La verkon, eĉ se ĝi estus granda, oni povus aperigadi pokajere kaj ĝis la lastaj literoj aldonadi ev. novaĵojn, rebonigojn en provpresaĵojn ktp. Oni povus komenci eldonadon, havante tajpitajn A-R literojn, ĉar la aliaj dume povus esti finitaj.

(2) Fakvortaristoj asertas, ke multo en la ĝenerala vortaro apartenas en la fakajn vortarojn. Ja oni eĉ rekomendas kompletigi iom la vortarojn de Fratoj Filip. La aliaj diras, ke tie troviĝas terminoj, kiujn ili ne konas. Evidente, ĉiu juĝas laŭ sia p r o p r a h o r i z o n t o. Sed ni ne forgesu, ke ĉiu el niaj miloj da esperantistoj havas sian propran horizonton kaj la venonta vortaro devas ĉion tion respekti. Kiu nur iomete legas nuntempajn gazetojn, devas nepre rekoni, ke la horizonto de la homoj t e k n i k i ĝ a s, ke multaj fakaj terminoj fariĝas posedaĵo de multegaj homoj kolektive.

Ni havas fakvortarojn, sed eĉ ne unu el ili estis enĉeĥigita. (Rim. de red.: Laŭvere, ĉeĥigitaj estis la Armea Terminaro kaj Terminaro pri ludoj, aperintaj en "Esperantista" de EAĈSR). Antaŭ ol tio solviĝos, ol oni kapablos ĉiujn Esperanto-Esperantajn vortarojn enĉeĥigi, nepre estas havenda iu bona riĉa ĝenerala vortaro, kiu helpus laŭeble en ĉiuj dubaj kazoj.

Esperanton oni ne renkontas kaj longe ne renkontados apud ĉiuj stratanguloj, necesas do, ke la vortaro estu k o n v e r s a c i a kaj uzu precipe uzmanieron de ĉiu koncerna termino.

Nia pedagogia sekcio plendas, ke ni ne havas bonajn junajn esperantistojn. Sed laŭ kio ili lernu, se ne ekzistas riĉa Ĉ-vortaro ? Ni mem klopodus plibonigi tiun ĉi situacion, sed nenie estas io ricevebla, kaj etaj vortaroj kaj aliaj lernilo j faras el ni duonklerajn lingvistojn. Evidente etaj vortaroj jam fariĝas anakronismaj, same kiel aserto, ke la internacian lingvon oni povas ellerni en dekdu lecionoj.

(3) "Garantio" ne ekzistas. Mi nur povas p e t i, i n v i t i, rekomendi kunlaboron kun nia Most-a rondeto. Multe gravas malhavo de necesaj plej diversaj vortaroj kaj en pli alta aĝo mankas jam entuziasmo, fantazio...

R e s u m e : tajpopreta estas la litero A, plue la litero B ĝis la vorto "blecháč, blechatý. Korekto de A estis plenumita de prof. Lukáš kaj Zd. Matyková, la B litero estas tajpata. Entute estas jam preskaŭ pretaj kvincent duonpaĝoj da terminoj. Ĉiu kostas duonan aŭ eĉ tutan horon da laboro ĉe tajpilo. Manuskripte estas pretaj la literoj C, preparataj Ĉ, D, E, G kaj P, pretaj (sen korekto) W, X, Y, Z, do kandidatoj de vortfarado havas sufiĉe da eblo j.

Krome ni serĉas plej diversajn fakulojn el la fakoj arkitekta, ĝenerale teknika, matematika, ev. komputila, plej serĉataj hidrologio, geologio, speleologio, aero- kaj kosmonaŭtiko. Detalojn poŝtulu de d-ro J. Černý, Most, U věžových domů, bl. 376, ev. ĉe Esp. rondeto ĉe OKH Most.

---

NABÍDKA ESPERANTSKÍM KROUŽKŮM V ČSSR. V Liberci pracuje hudební těleso FOLK MELODY TRIO, které má ve svém repertoáru také esperantsky zpívané písně. EK Liberec nabízí všem klubům v republice uspořádání koncertu /nejlépe v sobotu nebo v neděli/. Každý klub se může spojit s osvětovou besedou nebo kulturním zařízením v místě a uspořádat koncert společně s nimi. Cena za dvouhodinový koncert je 1 000 Kčs plus cestovné a diety. Informace podá jednatel skupiny Ladislav Š p í n a, ul. Kosmonautů 358, Liberec 5. Tam také zasílejte objednávky s uvedením alespoň dvou náhradních termínů.

## ESPERANTO EN LITOVAJ LERNEJOJ

Depost la lernejaro 1968/69 oni komencis en mezlernejoj de Litovio instruadon de Esperanto laŭ fakultativa maniero. La ministerio de klerigo de Litova SSR eldonis specialan programon, kie oni i.a. legas : "La lingvo Esperanto prezentas gravan socian fenomenon, valoran rimedon por rilatoj inter la popoloj, uzatan en diversa socia, scienca kaj pedagogia agado. La lingvo Esperanto ne havas la celon anstataŭigi la ekzistantajn lingvojn kaj fariĝi sola mondlingvo. Tamen estas klare, ke la socio bezonas egalrajtan kaj paralele kun la nacia lingvo ekzistantan lingvon, kiu povas estiĝi rimedo por komunikado inter ĉiuj nacioj".

Ĉiujare pli granda nombro da lernantoj elektas Esperanton kiel fakultativan studobjekton. Ekzemple dum 1969/70 Esperanton lernis ĉirkaŭ 500 lernantoj, sed dum 1970/71 jam 1120. La fakultativaj grupoj funkcias nun en pli ol 40 lernejoj de Litovio.

/laŭ PACO 1971/1, eldono de USSR/

### "JUNA AMIKO" POR VI !

La gazeto, kiun oni intencas eldonadi en Hungario, ŝanĝas iomete siajn celon kaj taskon. La redakcio decidis, ke ĝi estos destinita al geknaboj 12-16 jaraj, do tiuj, kiuj sentas sin jam plenkreskaj, legas pli ŝate aventurajn rakontojn ol fabelojn kaj ŝate solvas enigmojn, se ili estas interese prezentitaj.

La ĝisnunaj kontribuaĵoj de niaj gesamideanoj do ne povis esti uzitaj, sed la redakcio bonvenigas plujn materialojn, kiuj celas jam la ĝeneralan linion de la nova gazeto, kies nomo estos JUNA AMIKO. La kontribuaĵojn lingve perfektajn sendu rekte al la redaktoro Géza Kurucz, Árpád krt. 13, Kecskemét, Hungario.

Versimila abonprezo por ČSSR 20-25 Kčs, peranto : ĈEA, Praha 2, pošt. schr. 8

---

**EL UKRAINIO.** Ĉe la Domo de Sciencistoj en Kievo funkcias ekde 1958 Esperanto - sekcio, kies anoj regule kunvenadas. Kiel sciigis al ni la prezidantino de la Ukraina E-Komisiono N. Andrianova, lastatempe ĝia agado plivigliĝis kaj oni planas reorganizi ĝin en la tuturban Esperanto-klubon. Ĉe la Domo de sciencistoj funkcias nun du E-kursoj. La du aliaj estas ĉe la lokaj konservatorio kaj medicina instituto.

**ESPERANTO-KLUBO** ĉe la lerneja klubo de internacia amikeco en Primorsko-Aĥtarsk intencas ĉi somere organizi sur la bordo de la Azovska maro pioniran E-tendaron, unuafoje en USSR. (Sciigis N. Andrianova)

**ORDENO AL A.D. ATANASOV.** Kiel informis Bulgara Esperantisto, la Ŝtata Soveta de Bulgara Popola Respubliko honorigis la esperantiston-veteranon Atanas Danĉev Atanasov - ADA el Sofio per ordeno "Kiril kaj Metodij" - Ia grado, ora, okaze de lia 80-jariĝo kaj pro lia longjara agado por popularigo de la bulgara literaturo kaj kulturo eksterlande, plue pro liaj meritoj por la disvolviĝo de la bulgara kaj internacia Esperanto-movadoj.

**ORGANIZA KOMITATO DE HUNGARA KULTUR-FESTIVALO** atentigas la aliĝintojn, ke la giĉetoj de la Festivalo estos malfermitaj jam la 15-an de julio, sabate matene je la 8-a horo.

### RICEVITAJ PUBLIKAĴOJ

**PACO** - eldono de Soveta Unio, n-ro 2/71, 64 pĝ., riĉe ilustrita kun broŝurita aldonaĵo "Direktivoj de la XXIV-a Kongreso de KPSU por la jarkvina plano. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj.

**GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO** - Gravaj koncizaj informoj. Prospekton en E-o eldonis "Zeit im Bild".

**TURISMA BULGARIO** - Luksa prospekto kun kolorriĉaj bildoj kaj koncizaj komentoj pri la lando. Eld. Komitato de Turismo ĉe la Ministra Konsilantaro de PRB.

**ŽDIAR** - Aparta 16-paĝa faldfolio en E-o en la slovaklingva prospekto pri la pitoreska subtatra vilaĝo montara. Mendu ĉe EK ĉe Muzeo de Janko Kráľ, L. Mikuláš.

# Ankoraŭ pri la elektoj en Londono

Tiun ĉi temon tuŝas post prof. Ivo Lapenna (vidu n-ron 7/71) d-ro Werner B o r m a n n, estrarano de UEA, en sia letero al la redakcio de STARTO. Li skribas i.a:

"Mi estis tie (t.e. en Londono) elektita en la estraron kaj do "kunrespondecas" pro la troa ĝermaneco (du nederlandanoj, du germanoj, 1 svedo, 1 brito)...Mi estis plurajn fojojn proponita, mia nomo skribita sur la tabulo, kaj plurfoje mi forstrekigis mian nomon el la kandidatlisto. Tamen mi fine fariĝis konvinkita, ke mia estraraniĝo povus esti helpa al UEA. En la intertempo mi klopodegis persvadi miajn amikojn kaj konatojn ankaŭ kandidati : italon, danon, polon. De la kolegoj el la socialismaj landoj mi preskaŭ p o s t u l i s k a n d i d a t i. Bedaŭrinde, sufiĉe multaj komitatanoj - kelkaj kun tre grandaj ŝancoj esti elektitaj - rifuzis ... Ĉiu voĉdonanto preferis tiujn personojn el la listo de la kandidatoj,de kiuj li aŭ ŝi kredis havigi al la asocio la plej grandan utilon. La nacieco evidente ne ludis rolon. Kia - tamen - progreso!"

D-ro Bormann konkludas jene : "Kiu deziras pli diversnacian estraron, devas zorgi pri sufiĉe multaj kandidatoj por la estraraj funkcioj. Kaj la kandidatoj mem devas krei al si prestiĝon,kaj en la opinio de la elektontoj la konvinkon, ke estas ili, kiuj povas plej forte antaŭenhelpi nian aferon. Dum la 59-a UK en Hamburgo estos novelektoj, kaj ĉie la kapablulo j preparu tion. Certe estas oportune, ke pli da membroj de la estraro de UEA v e n u e l s o c i a l i s m a j l a n d o j."

Tiun ĉi komenton akompanas d-ro Bormann per "sincera laŭdo" por STARTO,skribante : "Kiel estrarano de UEA pri landaj asocioj mi legas tre multajn gazetojn de landaj asocioj. La via estas vere tre bona kaj por mi riĉa fonto, en ĝia Esperanto-parto, de eksciojpri la movado en via lando. Mi kore gratulas al vi".

## UEA KANDIDATIĜIS POR PACPREMIO NOBEL

La Nobel-Komitato de la Norvega Parlamento ricevis proponon,ke Universala Esperanto-Asocio estu - premiita en 1972 per la Pacpremio Nobel. La proponon sendis parlamentanoj, universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj el Britujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio kaj Norvegio.

La proponintoj akcentas la gravecon de komuna neŭtrala lingvo por progresigo de amikaj internaciaj rilatoj en ĉiuj sferoj de la nuntempa internacia vivo. La Esperanto-movado,ili diras,ne celas anstataŭigi la naciajn lingvojn, sed servigi Esperanton kiel instrumenton de lingva komunikado en la internaciaj rilatoj en la plej vasta senco de la vorto.

/Laŭ la gazetara servo de UEA /

**LA PREZIDANTO DE UEA**, prof.d-ro Ivo L a p e n n a ricevis honoran doktorecon de la Universitato Fort Lauderdale en Florido,Usono, pro sia scienca laboro sur la kampo de internaciaj rilatoj kaj pro la multjara laboro kaj atingoj por progresigo de la internacia lingvo Esperanto.

## ESPERANTO KAJ LA KIMRA LINGVO

Jam de pluraj jaroj estas kontaktoj inter la kimra naciista junularo kaj la juna esperantistaro; ĉefa agadcelo de la kimra junularo estas vivtenado de la belsona esprimriĉa kimra lingvo kaj la pitoreska folkloro, do la nacia identeco de tiu malgranda,ŝatinda popolo de "bonkoraj, ĥorkantaj ministoj".

Pri kimraj aferoj oni povas ricevi informojn pli detalajn de : Swddfa'r Urdd, Aberystwyth,Sir Aberteifi, Cymru/Wales. /revuo Esperanto/

## La leganto opinias

Interesis min la artikolo "Příliš mnoho politiky ?" (esp.Ĉu tro multe da politiko?, vd.Starto 1/72,rim.de red.) Mi tute konsentas kun la faktoj, kiuj estis eksplikitaj tie... Ĉu ne estas utila jam tio, ke ni povas uzi nian komunan lingvon ankaŭ en la sferoj de politika tendenco? Ĉu kelkfoje ne dependas de la politikistoj, ke ni povu kviete labori por disvastigo de tiu idealo, kies fundamenton kaj bazon kreis la aŭtoro de la internacia lingvo ? Ni devas ja interrilati kun la politiko kaj politikistoj, se ni volas disvastigi nian aferon, se ni volas, ke nia lingvo fariĝu almenaŭ samrajta kun la ceteraj !!! ... Kiu povus al ni pli bone helpi por la venonta oficialigo de Esperanto, ol la politiko kaj politikistoj ? Ni, esperantistoj, devas esti ankaŭ politikistoj kaj ni devas fari nian politikon se ne eminenta, tamen almenaŭ tre bona!!! Kompreneble, sub la kondiĉo, ke ni deziras atingi nian celon. Kaj kiu esperantisto tion ne volus ? Kiamanieran politikon ni faros, tiel aspektos ankaŭ la rezultatoj de nia agado.

M.Rybín (L.Mikuláš)

EN LA KAMPANJO "HELPE AL LA BATALANTA VJETNAMIO" ĝis nun finance kontribuis ĉi tiuj rondetoj (en kronoj) : Příbor - 50, Znojmo SZTŠ - 21, Hradec Králové -50,Brno PKO - 200, Třinec - 120, Praha - 333, Vsetín - 205, Mělník - 1566,85, Kopřivnice - 170, Bor u Tachova - 16 033, 25, Městec Králové - 100, Poděbrady-100, Bučovice - 100, Jablonec n.N. - 210, Cheb- - 1 349, Vev. Bitýška - 50, ZDŠ Praha 6- - 50, Teplice - 140, Jihlava - 50, Most- - 200, Poruba-70, Kolín - 25, Tábor -30, Opava - 100, Trutnov - 50, Pardubice-50, Písek - 20, Bonex Teplice - 191, KASS Cheb - 400 (entute 22 034, 20 Kčs).

SOMERAN LERNEJON DE ESPERANTO en Košice - Opátka okazigos inter la 5-a kaj 18-a de aŭgusto E-klubo en Košice sub la aŭspicio de AESSR. La kotizo 700 Kčs inkluzivas manĝadon, loĝadon kaj partoprenon en kursoj A (por komencantoj), B (progresintoj) aŭ C (konversacia). En la programo oni antaŭvidas diversajn kulturajn aŭ sportajn aranĝojn. Aliĝu ĉe EK Košice, SELKO, Rooseveltova 5, plej malfrue ĝis 10,7.1972.

RADIOINTERVJUO KUN K K S. Post la alveno de la KKS de UEA Mikuláš N e v a n al Portland okazis 15-minuta intervjuo ĉe nekomerca radiostacio KBOO Portland. La paroloj koncernis ĉefe la preparojn por la kongreso, sed ankaŭ la ĝeneralan informadon pri Esperanto.

La 5-an de majo Nevan estis akceptita de la ŝtatestro de Oregon, Tom McCall.

TRO MULTE DA INTERPRETISTOJ

En la interpretista servo de la Eŭropa Ekonomia Komisiono laboras 130 personoj, pli multe ol en la interpretistaj aparatoj de UNO-aŭtoritatoj en Novjorko kaj Ĝenevo. En 1970 okazis ĉi tie 5516 kunsidoj, t.e. 15 en ĉiutaga meznombro.Tial necesas kelkfoje okupi kromajn interpretistojn apud la daŭre salajrataj.Laŭ tiu ĉi amplekso de la servoj oni povas kalkuli, kiel ili devos esti plifortigataj, kiam ankoraŭ la dana,norvega kaj kaj la angla aldoniĝos ,sekvante la plietendon de la komunumo.

La plej multaj interpretistoj estas multjaraj rutinuloj, kiuj ne bezonas traduki laŭvorte, do ne devas kapabli stenografi. Ofte ili regas la fakon,en kiu ili interpretas, iom post iom same kiel la la fakuloj mem, tiel refutante la sloganon validan por komencantoj : "se iu studis lingvojn, plejofte li ne scipovas ion kroman".

(Laŭ Interlingvistika Informa Servo,nro 2/1972)

INFORMOJN EN ESPERANTO pri turismaj , kulturaj kaj arkitektaj valoroj de Malsupra Silezio kaj Wroclaw sendas Dolnoslaski Osrodek Informacji Turystycznej, Wroclaw,ul. Kołłataja 31, Pollando.

RECENZO KONTRAŬ LIBRO. Ĉiun presitan publikaĵon eksterlandan en Esp-o ni volonte recenzos kontraŭ alsendo de unu ekzemplero. Kontaktu red.de STARTO (ĈEA, p.k. 8, Praha 2, ĈSR.

DUDEKMINUTA MAGNETOFONA PROGRAMO pri K u b o kaj la esper.movado tie estas havebla ĉe EK Praha, p.k. 1069 .

# Okénko do sekretariátu

Jako každý rok chtěli jsme i letos získat největší část členských příspěvků již počátkem roku. Z uvedeného přehledu máte možnost posoudit, jak místní skupiny/esp.kroužky/ dokázaly dodržet daný termín. Celkem bylo vydáno již 2 970 legitimací, platících členů je však k 31.3.71 pouze 1648 ! Podle rozhodnutí předsednictva ÚV ČES obdrží člen svazu,který bude mít členskou legitimaci s číslem 3 000, knižní dar a bezplatné členství na pět let. Rovněž MS/EK/,jehož prostřednictvím se přihlásí, obdrží knižní dar a v příštích třech letech zdarma časopis STARTO ve třech exemplářích. Využijte této možnosti a věnujte pozornost náboru nových členů svazu !

**PŘEHLED MS/EK/ PODLE POČTU PLATÍCÍCH ČLENŮ /k 31.březnu 1972/:**

Bojkovice 1, Bor u Tachova 21, Boskovice 9, Brno PKO 86, Brno I.B. 13, Bučovice 19, Č.Lípa 9, Č.Budějovice 39, Č.Dub 4, Děčín 1, Díly 3, Frenštát p.R. 1, Frýdlant n.Ostr.9, Gottwaldov 6, Havířov 13, Havlíčkův Brod 16, Hodonín 5,Hořice v Podkr. 14, Hradec Králové 27, Hranice na M. 21, Cheb 7, Chomutov 1, Jablonec n.N. 33, Jaroměř 7, Jihlava ZK 12, Jihlava DK 4, K.Vary 14, Kladno 4, Kolín 23, Kopřivnice 81, Králíky 4, Kraslice 1, Kroměříž 1, Kyjov 16, Lanškroun 12, Ledeč n. Sáz. 1, Liberec 35, Lichnov 5, Litoměřice 2, Litomyšl 6, Louky n.Olší 1, Mělník 100, Mělník-H.Počáply 8, Městec Král. 8, Miletín 14,Místek 7, Ml.Boleslav 1, Mor. Budějovice 24, Most 9, Náchod 7, N.Jičín 10, Olomouc 12, Opava 27, Ostrava ČSD 10, Ostrava VŽKG 62, Ostrov n. Ohří 6, Pardubice 34, Paskov 111, Písek 25, Plzeň 39, Poděbrady 29, Polička 24, Poruba 20, Praha 270, Praha ČSD 1, Prostějov 20, Přerov 12, Příbor 1, Příbram 25, Roudnice n.L. 6, Semily 1, Slavkov 4, Sokolov 1, Stonava 30, Svitavy 17, Šumperk 40, Tábor 31, Trutnov 7, Třebíč 98, Třinec 42, Turnov 2, Ústí n.L. 27, Václavice 1, Veverská Bitýška 1, Vsetín 53, Vyškov 14, Znojmo MOB 8, Znojmo SZTŠ 17, Žamberk 6, Žďár n.Sáz. 28.

**PODPORUJÍCÍ ČLENOVÉ SVAZU V ROCE 1972 :**

J.Drlík - 100, A.Drlíková - 100, M.Hromas - 100, Št.Dimnjakovič - 100, R.Kopecká - 100, M.Čekal,- 100, J.Hanzelka - 100, D.Kočvara-100, M.Sova - 100, MUDr. Vl.Nekuda - 100, J.Rada - 100, MUDr.J.Černý -150, J.Patera - 100, Vl.Rozsypal - 100, O.Sklenčka - 100, D.Novotná - 100, F.Patera - 100, ing. J.Loub - 100, ing. Vl.Kočvara - 100,V.Havel-100, Al.Dlugi - 100, M.Mrázová - 200, B.Dorazilová - 100, Vl.Boudar-100, K.Steffel - 100, E.Dadák - 100, L.Kafka - 100, A.Lauterbach - 100, B. Grym - 100.

**DARY NA EDIČNÍ FOND :**

O.Dibelka - 6, M.Vybulková - 26, R.Kopecká - 44, D.Dobrovolská - 6, A.Staňková - 10, B.Bulíková - 24, Th.Kilián - 1 000, J.Kubásková-10, J.Tomčík - 26, B.Novotný - 7, EK Kroměříž - 36, J.Pařízek - 24,F.Vácha /Jaroměř/ - 6, J.Buben - 16, J.Beníček - 22, J.Adamec - 6, F. Maroušková - 15, K.Čurda - 20, dr. L.Fritsch - 40, J.Kašpárek - 7,MUDr. V.Pávek - 20, V.Kaplan - 25, B.Munzar - 25, J.Hladiš, D.Lounek-12, L. Fogl - 10, V.Stříhavka - 6, ing. Zd. Polák -20, Boh. Háva - 20, K. Majtner - 20. Všem dárcům i podporujícím členům děkujeme !!

# Korespondi déziras

SOVETIO (Estona SSR) - Lernantinoj 16 -17jaraj el Tallinn : Vivian KIVIRAI,Paiste 10-1,Tallinn 16, Ülle RIIM,Tammsaare tee 119-34,Tallinn 29, Tiiu LIIGAND Vilde tee 125-10, Tallinn 26, Tiiu PAIDRA, Pärnu mnt. 337-1, Tallinn 15, Epp KÜBARSEP, Muuluka 6-a, Tallinn 9, A. KIVI, Kalinini 28-9, Tallinn 4, Reet TAMIK, Välgu 3-1, Tallinn 16, Meelis VISKMANN, lernanto, Sobra 48-1, Tallin 9, Maie VEDAM 19j. oficisto, Märjamaa,Lauluväljaku 31, Linda ARUKAEV, 45j. poŝtistino, Rakvere raj.Pajusti s.jsk.

E-klasoj kun lernantoj 9-17j. (instruistino Eve Taar Jogeva, Keskkol) pri eksperimenta E-instruado al pli junaj lernantoj kaj pri la internacia amikeco.

Diversaĝaj kaj diversprofesiaj 15- 65 jaruloj,memlernantoj de E-o pri ĉ.t.Adreso : J.Paulu, Tallinn 16, Solme 21.

Novekzamenitoj de EK Zaporoĵje kun diverslandaj esp.: f-ino Larisa GOLOVKO, 23j.studentino, f-ino R.BASIROVA,23j.diplomita kemiistino, s-ro Anatolo JUDINCEV, 33j.operatoro, f-inoj Ludmila MAMLIEVA kaj Natalia KARANĈEVA,16j. lernantinoj kaj dekses aliaj geesp. el Zaporoĵje, Lenina 159, klub Esperanto,Sovetunio 330033. • Esp.poeto Danielo KOLKER kun spertaj sam.pri arto,poezio kaj virina belo, str. S.Kolcevaja 20--149, 330058, Zaporoĵje, USSR • L.ĈINAEV, 32j. inĝ.,353890 Primorsko Aĥtarsk Krasnodarskogo kraja,str.Kosmonavtov 196 USSR • Marina EZERSKAJA,18j.stud. pri matematiko, ul. Pervomajskaja 36,kv.28, Tula 34. Pri cibernetiko k.a. angle,esperante,hispane kun Kubo,Britujo,Usono-

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO - Renate LAMPE,356 Salzwedel, Mittelstr.9,muziko kaj danco • F-ino Roswitha HEINRICH, DDR-53, Weimar, Humboldtstr.7,kun amik(in)oj el ĈSSR • S-ro Werner JAHNKE, DDR-5301 Saalborn/Weimar n-ro 54,kun amik(in)oj el ĈSSR • S-ro Peter LORENZ, 5231 Gangloffsömmern, Goethe-lernejo, pri fotoarto,ornitologio,filozofio • Eberhard KÜTTNER, 23j.,DDR-9262 Frankenberg PSF 15, pri ĉ.t.

BULGARIO - Atanaska GENOVA, 18j. str. Dunav 2, Gara Bjala,distr.Ruse o Silvija TODOROVA,13j.,D.Blagoev 7, Bjala - - garata, Ruse o Sneĵana Genova GAĈEVA 15j.,str. Vela Tiskova 5, Bjala, d.Ruse, interŝ. b.k.

K U B O - René VALDEZ LOPEZ, ( vidu foton ) 23j.arkitekto, Pasaje General Lee 6, La Habana 5. Kun gejunuloj el ĈSSR kaj la aliaj mez- kaj nordeŭropaj landoj.Geedziĝo ebla, sendu la foton. o Esperantistoj vojaĝontaj al Kubo skribu al : Havana Esperanto-Rondo,Apartado 413, La Habana, Cuba.


POLLANDO - Maria POSLUSZNA,23j.teknikistino, Wroclaw 17, p.k. 1638, literaturo, teatro,moderna muziko • Bożenna MICHALOWSKA, 29j.lab.en hotelo, Warszawa, ul. Nowogvodska 38 m 20 • Janina MARKIEWICZ, oficistino, Warszawa 33,ul.Londynska 14 m 32

HUNGARIO - Lajos HEGEDÜS, Boya p.f. 27 • Judit KOVÁCS, Jászszentendrás (?),Akácpa (?) ut.15

RUMANIO - Sandor GHEORGHE,str. Steampului n-ro 8, loc.Baia-Mare, Jud.Maramurei.

SVISIO - Jugoslavo 35j. laboranta en Svisio interamikiĝos kun s-inoj el ĈSSR kaj USSR. Geedziĝo ebla. M. PAVLOV, CH - - 9500 WIL, Postfach 2941.

HISPANIO - Joaquina FLORENSA, Escuela Obispado de Egara, García Humet,nro19 Tarrasa, Barcelona Kun inf. 8-12 j.



Ĉ S S R - Vladimír CASKA, Moskevská 9, Brno,Královo pole. Pri natursciencoj,filozofio kaj psikologio.

NELEGEBLAJ NOMOJ AŬ ADRESOJ NE ESTOS VENONTE PLU AKCEPTATAJ !!!!!!!!

(rigardu KUBO )

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto--Asocio,p.k. 8,Praha 2.Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro O.Knichal. Redakta komitato : inĝ.E.Felix,J.Mařík,inĝ F.Sviták. Abonebla sole por la membroj de ĈEA. - Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ŘP Praha j.zn.P/1 - 2283/1971, dne 6.5.1971



Vytiskla: Početnická a organizační služba závod TISKOPISY. Praha 1, Vodičkova 34